

EŬGENO MIĤALSKI

---

# PROLOGO

Jubilea Kolekto  
de  
Originalaj Poemoj  
1918-1928



SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA  
ELDONA FAKO KOOPERATIVA / LEIPZIG



# PROLOGO

Esper 1025-1




149644



E. MIHALSKI

**PROLOGO**



Г. Довгоносский



EŬGENO MIĤALSKI

---

# PROLOGO

Jubilea Kolekto  
de  
Originalaj Poemoj  
1918-1928



19

29

*SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA  
ELDONA FAKO KOOPERATIVA / LEIPZIG*

Ĉiuj aŭlorrajtoj estas rezervitaj.

---

Permeson traduki kaj eldoni  
oni povas ricevi de Sennacieca  
Asocio Tutmonda, 23, rue Boyer,  
Paris (XX<sup>e</sup>).

---

La interna titolbildo estas de-  
segnita de 16-jara artisto.

---

Eld. 1929.

Eldonkvanto : 2000 ekz.





*Edli Dalski*



# PROLOGO

---

## Enkonduko

---

Al Vi, nekaptebla « os »,  
neniam kaj ĉiam as'anta,  
mi sendas poemojn de pensoj-ĥaos'  
el mia menso serĉanta.

« Is », « As », « Os » —  
tri elementoj de Tuto —  
finito, vivato, ĥaos' —  
problemo de Absoluto.

Triunuo de hom-superstiĉ',  
triunu' de profeta humano,  
Vi tra vivo miljaris fetiĉ',  
Vi — amboso por di' kaj satano.

Vi — serĉata de l' viv' eliksir',  
viva akvo, fabel-talismano,  
paroksisma freneza delir',  
temp-maŝino de Wells'a romano.

Sub sekcanta mens-analiz'  
de progresanta scienco  
kun ĝusta skrupula preciz'  
iam klariĝos esenco.

« Is — as » = estiv'  
sekvigas « os »-energion,  
tiel socia viv'  
produktas konscion.

Al Vi, sfinkse-enigma « os »,  
ĝis la scienco Vin solvos,  
kun poezia patos'  
mi florojn-poemojn disvolvos.

Sintezante en vorto-parol'  
ĝiajn fortojn de l' en' kaj ekstero,  
mi la menson risortos je Vol'  
sur la vojo al plena libero.

« Is » — « As » — « Os »  
tri elementoj de l' Tuto,  
finito, vivato, ĥaos', —  
problemo de Absoluto.

Voznesensk, Januaro 1928.

## Dediĉo al L. Ivn

---

Al Vi, amik', dediĉas mi verkoton  
el la intimprofunda kora en' ;  
se trovos Vi en ĝi ver-koton,  
purigu ĝin per propra kor-seren'.

Komencos mi sinceran retrospekton  
de miaj pensoj dum junula aĝ',  
kaj du sitelojn per balanca vekto  
sur fajna ŝnur' mi portas kun kuraĝ' .

En unu — akvo malvarmege-brula,  
kaj en la dua — vaporanta brog' ;  
en unu flank' de l'ŝnur' — nebulo,  
kaj en la dua — sun-prolog'.

Kienas mi ? Ne donos mi respondon,  
ĝin mi ne scias ankaŭ mem ;  
similas mi ribelvagantan ondon,  
batantan kontraŭ bordoj de problem'.

Ĉu la isas' produktas la konscion,  
aŭ male ĝin estigas la konsci',  
ĉu cia penso, hom', eligas ĉion,  
aŭ nur en ĉio onas ci ?

Nervece turnas-turnas mia penso  
foliojn de l'kreiva libr',  
kaj en sonanta preĝ-incenso  
•knaĝas rememoroj-vibr'.

Voznesensk, 5 Decembro 1923.

Al L. Ivn

---

En akordoj de l'kor' impresema  
mi agordis mian kreivon  
kaj el vivo banala kaj prema  
mi transiĝis alian vivon.  
Per sonoraj sonaroj mi spiris,  
promenante en rimo-aleoj,  
kaj literajn ensorĉojn mi diris,  
mi, grandegulo-pigmeo.  
Sur sonanta ale' mi renkontis  
vivan fonton de vorto-magio, —  
mi ne timis plu morton estontan,  
ĉar eternas kreeca genio.  
Kaj, vagante sur proza bulvardo,  
kie stumpoj glatstultaj fieris,  
mi renkontis hazarde vin, bardo,  
vi modeste kaj grize aperis.

Sed pro ena konscio nevole  
mia « mio » en « vio » sin solvis,  
kaj en la seriozo frivola  
    belpetalojn kunrozo disvolvis.  
Komuniis min via spirito  
el kaliko de l'son-sakramento, —  
kaj fariĝis mi via kaptito,  
    ho, amiko de mia belsento.

Voznesensk, 1 Junio 1923.

## Letero al L. Ivn

---

El malproksima proksim'  
denove kun Vi mi parolas,  
    kaj ĝojas la korda anim'  
    pri eblo de l' kara intim'.  
Mi volas,  
mi volas varian humoron  
    enstampi sur blanka foli',  
en versojn enspiri la koron  
    de l' poezia delir',  
    partumi plezuron, doloron  
    kun Vi.

Ho, kiom kolombas la koro  
en vana aspir'  
al kuniĝo.

Ho ve, rememoro  
pri l' horo-  
-disiĝo.

Krajon' en hezito haltas,  
zigzagas la duboj je l' menso,  
falas kaj saltas  
akre-vibranta penso.

Krei —  
dolĉe-amara destino ;  
suferas la menso en penoj,  
ĝojas la kor' en la sino.

Krei ! ? —

Postulas la tuto :  
amo, naturo, socio,  
eĉ bruto.

Krei en sonoj — ĥameleonoj,  
sunoradioj — varioj.

Krei, —  
perei, naskiĝi kaj droni,  
sveni

ĉiam, konstante, subite.

Ho, mia revo —  
devo  
de l' baraktanta spirito.



Vi nur ĝin povas kompreni  
kanto-amik' — satelito.

Novo, malnovo,  
kutimoj,  
movo

de l' hezitantaj rimoj — limoj.

Eterna flagranto —  
tra densa mallum'  
diamanto.

Ĉu Vi ion komprenis  
tra fragmenta deliro,  
amiko ?

Furiozaj, ĝojaj kaj rapidaj dancoj  
korpon mian pikas kvazaŭ akraj lancoj,  
koron mian ŝiras kaj turmentas ili,  
tamen mi deziras trili, trili,  
trili.

Voznesensk, 20 Majo 1923.

## Mi stelojn jungos...

---

Mi stelojn jungos al revado,  
kaj ili portos min tra bluo  
en landon de la nemortado,  
de la eterna vivo-ĝuo.

Do, arogantu mia kanto,  
do, akresonu mia verso.

Mi estas forto kaj giganto  
kaj regontul' de l' universo.

La morto?! Ho, ĝi plu ne tedos,  
restinte sole nur simbolo;  
je l' universo nur procedos  
la menso de l' scienca volo.

Voznesensk, 26 Oktobro 1921.

## Mi estas...

---

Mi estas pokalo de belpoezio ;  
Mi estas martelo de ver',  
Mi estas fontano de versfantazio,  
Potenca liber !

Mi estas modesta, sen celo je « nomo » ;  
Mi estas fluganta la vent' ;  
Mi estas de floroj flosanta aromo,  
Ribela torent'.

Mi estas realo. Mi estas fantomo.  
Mi estas de l' am' sakrament'.

Mi estas animo kaj koro de l' homo,  
Rapida moment'.

Mi flugas tra l' mondo kaj ĉiuj min kantas.  
Mi flugas per kanto-flugil'.

Mi flugas fajrere kaj flamdiamantas  
En koroj per tril'.

Mi celas ne famon. Mi celas ne « nomon ».  
Mi celas ne brilon de l' or'.

Mi celas ne laŭrojn, nek bardan diplomon,  
Nek pompon de l' glor'.

Mi kreas por krei. Sen ia kromcelo.  
Mi kreas poemon el kor'.  
Mi kreas per ĝi monumenton de l' Belo  
En versa kolor'.

Saratov, 28 Decembro 1918..

## Perlas per la belo stelo-stilo

---

Perlas per la belo stelo-stilo,  
kun facile spruças Esperanto —  
gaja tril' de l' najtingalbabilo  
dum trankvilo de l' printempa kanto.  
Amo de l' universeca koro  
en kristalo de l' penetra penso  
brilnuancas en bukedo-ĥoro,  
sonparfumas en versaĵ-incenso,  
vibras en la melodioj-ĉarmoj, —  
fibroj de l' animo poezia, —  
en ĝoj-ploro aŭ maldolĉaj larmoj,  
en intimo kun revad' vizia.  
Torenteco de l' pasi-deziro  
sur la verda kampo de la amo,  
radieco de l' revad-inspiro  
kaj neniam foriĝanta flamo.

Antaŭ la ĝardeno de l' beleco,  
permanenta celo al grandozo,  
for de l' korpo en la animeco  
estas mia farnient-ripozo.

Voznesensk, 1 Aprilo 1922.

## Ciklo de l' Argenta Astro

*Dediĉas al Nekrasov N.*

### I

Aspergas mi per spermo de l' espero  
virginon de l' argenta astro  
en la arom' de ŝia sino ĉasta  
dum farniento de l' vespero.  
Aspiras mi per spiro de l' pasio  
elkrei novan mondon de la sonoj —  
mi, nova pastro de l' venonta dio :  
virgino de l' argenta astro  
de l' fantaziaj tonoj.  
Al foraj kaj viziaj regionoj  
mi venas de l' estonto gasto,  
virginon aŭreolos mi per kronoj  
el fonto de l' anim' elasta.  
Karesvario — ritmo de l' mezuro  
de mia am' senfunde-ĝua ;

kaj kisoj dolĉaj — rimoj-uverturo  
de l' delikatpasio blua.

Kaj sakramentas mi dum la vespero,  
mi nova, juna kaj onteca pastro,  
virginon de l'argênta astro  
aspergas mi per spermo de l' espero.

## II

En ornato orname orita  
ĉe altaro de l' vorto mi staras,  
kiel orfo ĉe pordo fermita  
de l' morto...

Kaj orgen' al orelo ordonas  
enaŭskulti por ĉiam sonkulon —  
orakolon de la Oriono  
radia...

Tra la orto al la oriento  
kore celas dezire-ribela  
oremuso de mia belsento  
aspire...

Oro, ornamo, ornato  
alternas en alto interna...

Mi — pastro de la nekonato —  
staras ĉe ĝia altaro  
lumate de l' astro eterna  
argênta.

### III

Per akraj strofoj mi transversos vivon,  
kreante revan riĉon,  
amaran forgesante efektivon  
kaj malfeliĉon.

El kaĝo de l' tagvica trivialo  
mi celas al mistera transo,  
mi — Don Kihot naivkristala —,  
por esti for de Sanĉo-Panso.

Per trilflugiloj de koloroj-versoj  
nuancas mi per skvamoj-asonancoj  
kaj ronde-flugas tra la universo  
en furioz-ebriaj dancoj.

Por iu « danse macabre », — por mi nur gajo  
kaj senfineco de l' mezuro,  
por iu — vintro, sed por mi — floranta majo  
kaj brila suno en lazuro.

Ĉu iu kredos mian religion —  
ne interesas min ja tio,  
sed mi adoras fantazion, —  
ĝi estas mia dio.

Kaj antaŭ la altaro de Fabeloj  
incensas mi, poeto-pastro ;  
Virginon de l' arĝenta astro  
adoras mi en himnoj belaj.

#### IV

En maten' perlamote flagranta,  
kiam brilis la ros' en petaloj,  
al surlagaj lilioj-pokaloj  
vidis mi beljuninon kurantan.  
Diafanis la korpo gracia,  
en la faldoj de lag-arbetaro  
papiliis orece la haro  
sub la kisoj de l' suna radio.  
Kaj aero karese vualis  
belfiguron de l' stranga junino ;  
sed subite ŝi falis,  
    en unu momento  
    mi alkuris, rekonis :  
        Virgino  
        de l' astro argênta.

Voznesensk, 28 Novembro 1922.



# Amaj Melodioj

---

## I

Finiĝas nokto. En ĉirkaŭpreno  
ci kisas min, karesas, flustras kun pasio.

Susuras silko sur kuseno...

Maten' de l' am', de l' tag' mateno... —

Unua ora sunradio

penetras ĉambron tra kurteno...

Okulojn ci fermetas, dronas en ebrio...

Leviĝas mi, malfermas pordon al ĝardeno...

Parfumas mole akacio...

Kaj ĉio vokas, logas al promeno ;

kaj spiras vera poezio

en tiu ĉi vilaĝ-edeno.

Ci levas ankaŭ cin kaj min pro ĝeno  
elpelas for kun koketema krio :

« Ho, iru tuj — ne estas ja konveno  
ĉeesti dum ceremonio  
de la vestado... »

— « Granda Dio !

Pro kio tia ĉi kateno !



Cin ĝui volas mi ja ankaŭ dum mateno... »  
Sed pordo frap ! eĉ malgraŭ mia peno  
kaj malgraŭ mia opinio.

Saratov, 19 Januaro 1921

## II

### HEINE-ECAĴO

Puto profunda — jen Via rigardo,  
puto kun akvo serena ;  
tamen, junino, mi estu singarda :  
eble ĝi estas venena ! ?  
Bluo ĉiela — jen Via rigardo,  
bluo karese-edena ;  
tamen, karino, mi estu singarda :  
eble ĝi estas gehena ! ?  
Lango korala — jen Via ponardo,  
lango alloge-kaprica ;  
tamen, belino, mi estu singarda :  
eble ĝi estas malica ! ?  
Via buŝeto, brulanta en ardo, —  
— rozo ravanta kaj bena ;  
tamen, junino, mi restu singarda :  
eble ĝi estas venena ! ? !

Voznesensk, Oktobro 1921.

### III

Mi min kaŝis en bosko kaŝtana  
en krepusk' de l' printempa vesper',  
sur la musk' sub la kron' diafana  
kuŝis mi. Simfoniis mister'.

La mister' de l' natur' simfoniis :  
en folioj susuris fabel',  
en river' en reflektaj helstriis  
per la plektoj arboja ombrel'!

Kaj mi ĝoja en reva krepusko  
sur la lim' de la lum' kaj mallum'  
ne evitis fatalan embuskon  
kaj fariĝis viktim' de l' parfum'.

De l' parfum' de la korpo virina  
aperinta subite en bosk',  
saturite mi svenis al sino,  
kien logis potence la mosk'.

Kaj kadence trembatis la koro  
pro alflu' de l' volupta pasi' ;  
kaj en ĝu' de l' virgeca doloro  
mi abruptis kaj dronis en ŝi...

Disburĝonis kaŝtanaj la floroj  
kun kreiv-geedziga polen',  
ĝi miksiĝis kun niaj odoroj  
en mistera pasia solen'.

Voznesensk, 11 Decembro 1923.

## IV

En koloroj de vespero am' fabelas,  
lulas senton de la koroj am',  
jen mantelas per etero, jen nebulas  
firmamenton je l' disiĝo-gam'.

Nin ĉirkaŭas freŝgirlando el la floroj,  
de l' muziko bela rava son'...  
Vokoj-ploroj el verando kun mistiko  
de ribela fluas violon'.

Inspirite de ĉi-sonoj mi cin kisas,  
tremas cia kortuŝite Brust',  
nin kulisas floraj kronoj... mi cin premas,  
dolĉo mia... benas nin arbust'.

Sed jam falis noktaj horoj... mortis kantoj,  
kiujn pure najtingalis kor'...  
Diamantoj-rememoroj restis nure...  
...amaj ĉarmoj pasis for.

Saratov, 14 Decembro 1918.

# Paraleloj

---

## I

...Novo — malnovo,  
eterno — momento,  
potenco — senpovo,  
feliĉo — turmento.

## II

Edeno — infero,  
kompato — kruelo,  
beato — sufero,  
mildeco — ribelo.

## III

Revado — konfeso,  
timemo — arogo,  
memoro — forgeso,  
vereco — mensogo.

## IV

Amemo — pasio,  
hontemo — senĝeno,  
tuteco — nenio,  
libero — kateno.

## V

Kareso — insulto,  
konfido — ĵaluzo,  
konstanto — adulto,  
sincero — amuzo.

## VI

Adoro — malamo,  
promeso — ĵurrompo,  
trankvilo — ekflamo,  
fidelo — fi-trompo.

## VII

Trotakso — banalo,  
diigo — profano,  
vizio — realo,  
anĝelo — satano.

## VIII

Modero — senbrido,  
tolero — postulo,  
kolombo — aspido,  
sindono — spekulo.

## IX

Naturo — komerco,  
pureco — malĉasto,  
malsperto — ekzerco,  
similo — kontrasto.

## X

Ekflugo kaj falo,  
heroo kaj vermo,  
espero — fatalo,  
naskiĝo — ekstermo.

Jen estas varioj de l' amo —  
burlesko kaj dramo !

Saratov, 5 Aŭgusto 1918.

# El Ciklo "Frenezo"

*Dediças al Hohlov N.*

## I

Vi estas mia ĝemelo  
de nasko ĝis morto mem.

Ofte vi estas anĝelo,  
pli ofte — anatem'.

Vi akompanas kvazaŭ la ombro  
dum tago kaj dum nokt',  
de lulilo ĝis tombo,  
dum ĝoj' kaj dum vivsufok'.

Kaj vana estas la peno  
min liberigi je vi :

Vi estas dolĉo, kateno,  
jen siblo, jen belmelodi',  
jen konsciencia riproĉo,  
jen elintenca malbon',  
jen de l' spirito diboĉo,  
jen adoro antaŭ madon'.

Ĉiam nur disduiĝeco,  
sopiro al mensa tut',  
de l' cerbo kaj kor' — sanga peco,  
dram' de l' individu'.

Voznesensk, 19 Februaro 1922.

## II

En ringecaj ĉirkaŭprenoj  
mi mortpremos vin.  
Viaj ĝemoj kaj malbenoj  
ne haltigos min.  
Vi ja estas Bon' — Malbono ;  
tial mortu vi,  
ĉar la Bono estas krono  
de la iluzi'.  
Iluzio estas peza  
por verama kor'.  
Sed mi estas ja freneza !  
Tial, ĉio, for !

## III

Mi estas freneza — mi tion konscias ;  
sed en la frenezo — geni'.  
Mi vin abomenas kaj vin ne envias  
pri via banal-harmoni'.  
Per miaj frenezaj kaj akraj okuloj  
penetras al transa mi viv',  
kaj kion de vi kaŝas densaj nebuloj  
por mi estas ĝi — efektiv'.

Voznesensk, 2 Oktobro 1921 .



## IV

Super mi etendiĝis kupolo,  
kupolo, simbolo de Io,  
de Io, fulmanta radio,  
radio en strangaŭreolo.  
Super mi etendiĝis kupolo.

Jen sub mi disegiĝis profundo,  
profundo, senfundo nigranta,  
nigranta en rido faŭkanta,  
faŭkanta simile al hundo.  
Jen sub mi disegiĝis profundo.

Ĉiuflanke gardadas min muroj,  
min muroj — obturoj ĉirkaŭas,  
ĉirkaŭas, moviĝon kontraŭas,  
kontraŭas kun pezaj murmuroj.  
Ĉiuflanke gardadas min muroj.

Mi kun koro ribela deziras,  
deziras, sopiras Liberon,  
Liberon, purigan aeron,  
aeron... Premite mi spiras...  
Mi ribela Liberon deziras.

Ĥarkov, 12 Aprilo 1919.

## V

Ĉu aŭdis vi ion dum nokto silenta ?  
Ĉu vidis vi ion tra densaj nebuloj ?  
Ĉu aŭdis vi ion en bruo torenta ?  
Ĉu vidis vi ion en ŝiaj okuloj ?

Dum nokto silenta  
mi aŭdis pacigan en kor' harmonion ;  
tra densaj nebuloj  
mi vidis flagrantan de l' vero ekflamon ;  
en bruo torenta  
mi aŭdis belegan de l' kor' simfonion ;  
en ŝiaj okuloj  
mi vidis aŭroron de l' amo kaj amon.

Dum nokta silento  
mi aŭdis ekfrapon de ĉerka tegmento ;  
tra densaj nebuloj  
mi vidis iradon de strangaj mortuloj ;  
en bruo torenta  
mi aŭdis mokridon de l' sorto sensenta ;  
en ŝiaj okuloj  
mi vidis jam morton de l' amaj ekbruloj.

Voznesensk, 1919.

## VI

Sur deklivo de mia amo  
mi konstruis palacon de l' ĝuo;  
en sensone obtuza malbruo  
nevidita okazis dramo.

Belaj gastoj palacon vizitis,  
eksonoris pokaloj pasiaj;  
sed la koron la menso spitis, —  
estingiĝis la sunoradioj.

Kaj en alta palaca turo,  
kie miozotas memor',  
jen eksonis uverturo  
de l' rekviema ĥor'.

Kaj la gastoj toastis Eternon,  
sed la ombroj dancadis tra muro,  
kaj mi vidis faŭkantan kavernon  
en blindiga purpuro.

Kaj en halo de l' sento senbrida  
violonon ekludis la Strango:  
uragane-rapida  
ĉiujn premis muzika lavango  
de violon',  
sed la arĉo krevis en kreo,  
eĥe mortis lasta son' —  
Pereo.

Sur deklivo de mia amo,  
kie staris palaco de l' ĝuo,  
nevidita okazis dramo  
en sensone-obtuza malbruo.

Voznesensk, 24 Junio 1923.

## VII

Antaŭ altar' de l' Eterna Spirito  
staras mi, — splito de Malnova mond' —  
kun kron' el superstiĉoj, kun scepro el mitoj,  
kun de l' antaŭjuĝoj rond'.

Kandel' de la kred' estingiĝas, finbrulas,  
svene aromas incens',  
sed en la cerbo arogi stimulas  
sakrilegia pens'.

Mi falas genuen kaj preĝas-profanas,  
al kiu, pri kio ne scias mi mem,  
sed mi antaŭsentas, ke mian malsanon  
kuracos finsolvo de tiu problem'.

Voznesensk, 1923.

## VIII

Ĉe abrupto zigzage faŭkanta,  
ĉe abrupto de alta rok'  
staris mi meditanta,  
ĉu riski je arog'.

Variis-vibris la deziroj,  
kaj svarmis pensoj en la cerb';  
mi sakramentis en aspiroj  
al la ĉielo for de l' ter'.

Sed faŭkis malsupre abrupto  
kaj tiris potence al si,  
kaj en turmentiga volupto  
falas mi.

Sed mi ne atingis la subon  
kaj ie kroĉiĝis en mez',  
kaj suĉas min akra inkubo  
en la paroksism' de l' frenez'.

Voznesensk, 28 Novembro 1922.

## IX

Kial, amik', ne vizitas vi min ?  
Mi ja brulas, finbrulas en Fajro sen fin'.  
Sed neniam en ĝi  
fincindriĝos mi,  
nur suferos en fum'...  
El post lando de Fajr',  
jen Mallum'  
sen ekĉes' por moment'  
alrampadas kaj pikas min ĝi,  
je l' tempi'  
per duobla langeto-serpent'...  
Ho, kunlig' de Helfajr' kun eterna Mallum',  
ĉu min longe mordetos Vi?!

. . . . .

Brulas-brulas mi  
en la Fajra pasi'.  
Sed ekbrilos Radi'  
en triumfa moment'  
el homara sufer' kaj turment'.

Tiam en kvietec' mortos mi.  
Ho, amik',  
ja ekbrilos Radi'.

Saratov, 11 Septembro 1917.

## X

Ombroj vesperaj — movoj misteraj  
rampas....

Ĝemas piano, kvazaŭ infano  
ploras,  
lampo  
finbrulas...

Mi rememoras...

Rememoroj enlulas.

En malproksimo ie en nigra senlimo  
Vagas spirito sola simile al splito  
de « memo »;  
nenie  
ĝi trovas  
realon en foro simbola...

Ombroj-spiritoj sin movas ;  
ploras piano kun ĝemo.

Interplektiĝas la ombroj, sin puŝas,  
pereas...

Koro silentas, duboj ĝin tuŝas,  
sonoj lamentas,  
veas  
al vivo-pasio...

Lampo finbrulis, restis nenio ;  
nokto tegmentas.

30 Decembro 1918.

# El Abismo al Suno

## Ciklo de Poemoj

---

« ... Vi, Esperanto, estas mia prismo,  
Tra kiu vidas mi el mia ĉiel'.  
Tra vi mi vidas nigron de abismo,  
Tra vi mi vidas blankon de ĉiel'... »

N. NEKRASOV.

La vivo estas varia. Ĝi kiel ĥameleono jen tiel kolorbrilas, jen tute alian brilon disradias.

Kaj, ĉar la kor' de poeto estas de l' vivo spegulo, evidentas, ke ĝi ankaŭ ĥameleonas, varias en multefacetaj kristaloj de l' verso, trile nuancas, najtingalon simile; ravas la muzikeman aŭdivon per torente-rapida tonaro, son-imitas la naturon, sian patrinon, aspiras al ĝi kaj nure el ĝi ĉerpas forton por plua batado...

Sed iufoje, kelkiam, venas tro pezaj minutoj... Ĉielo de l' vivo tegiĝas je nigraj teruraj nubegoj ; tondras kaj fulmas ; fulmeroj rapidaj,



kiel korbatoj timigitaj, subite por ioma tempo ekbrilas kaj montras inversan bildon de l' vivo; ili montras profundajn abismojn de l' subkonscio, kie vane-vane baraktas la menso, celante ilin forlasi... Vane! Ili montras lagon ŝlimitan, kie dronas-aperas spirito, celante al roko alta sur bordo; ili montras ankoraŭ multon, multon...

Ankaŭ al tiu mallumo kun fulmeroj kaj tondroj donas lokon en si la timigite angora kor' de poeto, ĉar ĝi, peza mallumo, tamen estas unu el fenomenoj de l' ĉirkaŭanta natur' kaj socio...

Kaj tiuj diversspecaj fenomenoj, ofte tute nerimarkeblaj al la simpla koro, rapide alternas en kor' de poeto, stampolasante en ĝi la postesonojn...

La poeta kor', malgraŭ sia amplekso, povas tamen ne ĉiujn sonsignojn enhavi; kaj ĝi unue pro sia komunikigemo, due pro simpla bezono partumi ĉion inter ĉiuj, ĉion donitan, fokusitan de l' naturo en unu koro — havigi al ĉiuj, al vasta rondo, la kor' de poeto eldiras tiujn postesignojn-impresojn, eldiras en gamoj de sonoj-vortoj, proksimum-ĝuste esprimantaj esprimendon de l' koro; ilin eldiras tiel, kiel ili venas en la koron, t. e. varie,

hameleone, fragmente, abrupte aŭ konsekvence.

Tial ankaŭ en poemoj « Ajno », « Papilio » kaj « Printempajoj »<sup>(1)</sup> vi vidos tre akrajn ŝanĝojn de l' ritmo, ĉar same akre abruptas, nuancas la pensoj, ĵetataj nervece de l' ideo, sub kiu zigzage-tremas la grundo, ĝin produktanta.

---

(1) Rim. de l' aŭtoro : « Papilio » kaj « Printempajoj » pro miskompreno aperis aparte de l' unua poemo « Ajno » en libreto sub titolo « Du poemoj ». Ankaŭ la antaŭskizo verkita de l' aŭtoro mem estis erare atribuita al K-do Krassovski N.

# Ajno

---

*Dediĉas al amiko Izgur E.*

Rapide.

Streĉvervas muskoloj...

Posthorizontas la suno.

Krepuskas la kor'

en sopiro.

Golgotas la vivo.

Nigras du krucoj.

Grakas amasoj da korvoj,

sentante mortontojn.

Manon al mi, amikino,

lipojn sur lipojn

de l' ama konfid'.

Golgotas la vivo...

Nigras du krucoj...

. . . . .

Knaras radoj, krakas pordoj  
fajfsirenas aŭtoj...

Brilas vitroj magazenaj...

Kalvas placa rond'.

Ĉielenas templa pinto  
reliefe.

La dekdua.

Estingiĝas lum'.

Glitas ombroj fantomecaj,

malaperas en la grizo

de nebula ŝalo.

Ŝi kaj mi

en densa maro

de banalo.

Dereliĝis tramvagono —

kaj ekbluis la fajrero ;

tra la grizo kri' eksonis,

kri' de malespero.

Golgotas la vivo.

Du krucoj. —

Ŝi kaj mi.

# I

Super urbo pendas nebulo peza,  
lanternoj palpebrumas ;  
estas noktomezo  
malluma...

Mi straten eliris enpenso, sopira :  
min jam vivo tedis  
per kutima iro.  
Mi oscedis.

Mi spertis en vivo pri multo,  
travivis maldolĉon kaj ĝuon ;  
en mez' de banalo kaj stulto  
mi trovis enuon.

Mi vidis de l' Scio palacojn,  
loĝatajn de alta scienco,  
kaj tie nur trovis grimacojn  
de saĝa sensenco.

Mi templojn vizitis de Dio,  
mi vidis en ili brilpompon,  
kaj trovis en masko de pio  
profiton kaj trompon.

Mi amis per koro juneca  
kaj revis estante poeto,  
sed estis en am' multespeca  
ĉiama ripeto.

Mi volis en lego forgesi  
premantan sufokon de l' vivo,  
sed fine mi devis konfesi  
pri mia naivo.

Kaj en nokto nebula mi hejmon forlasis  
kun ĝia komforta ripozo...  
Kun sento malvarma je ŝton' mi frakasis  
violonon de prozo.  
Ĝi ektintis obtuze, mortante kun ĝemo...  
Ekpendis malluma silento.  
Tiele post la rekviemo  
venas ĉerka tegmento.

En noktaĵon mi iras tra malseka pavimo —  
mi ĉasas al novo kaj freŝo ;  
en la proksimo  
ekbruis kaleŝo ;  
preter mi ĝi ruliĝas, tie sidas junino  
belega sub ŝalo aĵura.  
— « Haltu, virino !  
ĉu Vi konsentos je la promenado plezura  
tra nebuloj de sento volupta  
al ĝuo abrupta ? »  
— « Mi volas. » Ŝi simple rediris  
kaj elkaleŝiĝis rapide.  
... Ni ekiris.

## II

Mi vekigis post nokto de amo plenplena —  
estas mateno...

Al vizaĝo ŝia mi rigardas, ŝi kviete dormas,  
ŝiaj belaj formoj

de l' korpo pasia  
estas karesataj de la sunradioj,  
penetrantaj tra l' kurteno.

Kial silente mi staras, ĉu mi bedaŭras,  
ke nokto finiĝis, ne daŭras  
la iluzio?

Ĉe la lito mi ekkaŭras,  
longe, longe sidas tiel, ŝin rigardas,  
ŝian sanan dormon gardas,  
dormon de ripozo dolĉa.

Ho, virino sorĉa!

Ne! pli vere — korpo sorĉa, korpo dia  
en nudeco sia!

Ci, — ekstremo de komenco, —  
ci, — komenco de ekstremo, —  
frenezigas per potenco  
de eterna am-problemo.

Ruĝa disko elnaĝas en grizekolora ĉielo,  
perlas roseroj en vazoj sur floroj,  
nuancas panelo  
en ĉielarkaj koloroj...

Ludas radioj petolaj sur lipoj de la kuŝantino,  
sur lipoj — pokalo de ĝuo...

allege-incite defalis kovrilo de sur la junino,  
postulas la kisojn ŝia neĝblanka genuo.

Ŝi dormas en paco  
post laco  
pro nokta kares' malmodera.

— « Virino, adiaŭ!  
min vokas « hodiaŭ »  
per bruo enurba por laboro afero... »

Velkis ombroj lastaj de l' mateno, —  
ridas tago en sereno  
de la suna brilo;  
blekas-fajfas la sireno  
de aŭtomobilo.

### III

Hejmen mi venis. La mastrino leteron  
donas al mi parfumantan  
je subtilaodoro de la akaci'.



Ekriĝardis mi la skrib-eksteron  
virindelikatan, bel-elegantan...

« Kies estas ĝi ?

Unuafoje mi vidas... Virino ? Sed kiu ?

Pli rapide deŝiru koverton kaj sciuj :

« Min ebriigis karesoj de l' nokto... Kun Vi do  
mi ilin deziras ripeti

kaj tial kuraĝas Vin peti

Hodiaŭ je l' 10-a vespere... Kaj nun ĝis revido !

(La strato de l' Venko, dom' la 80-a,  
2-a etaĝo, pordo la 31-a). »

Kaj netralegebla parafo la streka —  
fin' de l' skribaĵ' rendevua.

#### IV

Ĵus eklumis la elektraĵ lampionoj,  
superŝutas ĉion je lumstrioj ;

rapidege brue kuras tramvagonoj,  
ne atentis tute pri stacioj

plenplenegaj de amaso.

Poezio de l' dudeka jarcento —

bruo de la urbo multifaceta,

vulgarec' de l' degenera sentimento

kaj falseco de l' kalvaĵo kabineta —

— pitoreska viv-kanvaso

porpoeta...

## V

Kaj vizitis mi Cin, mia karo,  
     mia helo kaj belo radia ;  
 sur kanapo en la buduaro  
     jen Ci kuŝis kun simpla gracia  
 La krepusko de l' ĉambro ekpendis,  
     araneis nigraĵojn sur pluŝo ;  
 diafanajn Ci manojn etendis,  
     kaj ni ambaŭ svenetis en tuŝo.  
 Sed ne prenis mi Cin. Cin profani?!  
     Cin, ekamon de mia animo?!  
 Mi permesis nur kisojn fontani  
     en ĉi-tiu danĝera intimo.

Piko de kiso... Volupto kaj ardo...  
 Bril' de okuloj, dezira rigardo...  
     Brusto ondanta...  
 Spiro bruliga, spiro-ponardo...  
     Ĝuo loganta...  
 Flustro de nokto... Batbatoj de koro. ..  
 Flos' de parfumoj... Narkotaodoro...  
     Spic' romantika...  
 Dolĉo amara... Saniga doloro...  
     Estu fortika!

Ci ne komprenis mian foriron  
     tiom nervecan, rapidan,

sed en Cia rigardo deziron  
    vidis mi tiom avidan...  
Ci ne komprenis, jes, ne komprenis!  
    sendis leteron-inviton...  
Sed mi ne povis kaj mi ne venis —  
    timis mi korpo-eksciton.

    Mi deziris tamen ankaŭ tion,  
        pro dezir' mi brulis;  
        korpon korp' postulis,  
sed profani mi ne povis poezion —  
kaj en versoj mi forgesis la doloron  
kaj en songoj kvietigis mian koron...  
        Tamen brulo restis,  
        kvankam revo festis  
                venkon provizoran.

## VI

Kaj duan fojon mi serĉi eliris,  
    vagis denove ĝis laco  
    tra tiom senfina viv-spaco  
    kaj nur la malsanon akiris  
        de l' korpo kaj menso;  
    anstataŭ kompenso  
ricevis de ŝajna feliĉo temperon  
    kaj plen-malesperon  
        de sento kaj penso.

Montoj, abismar' senfunda; de ĉielo blu' profunda  
Monotona step' enua... Paŝas mi en horo frua  
Densarbaro grumblas ion, piedpremas mi folion  
ĝi jam flavas, ĝi susuras, kaj fabelojn ĝi mur  
Al la lando malproksima, [muras  
al palac' de l' rev' intima  
iras mi  
tra flav-foli'.

Akvofal' potence-brua ŝpruce-kantas, muĝeflu  
Kaj batalaskontraŭ bordo kun titane-akra mordc  
en koler' obtuze spiras. Ĝian forton mi admiras  
Estas ĝi mirinde bela en batalo ekribela.  
Al la lando malproksima  
iras rekte mi sentima  
kun admir'  
je l' akva spir'.

Jen river' kviete fluas. La venteto kanon skuas  
Nur malofte fiŝ' ekplaŭdas. Pli orel' nenio  
[aŭdas.  
Jen fiŝisto kun la reto klindormetas en ŝipeto  
Ludas en herbej' infanoj — ridas kun aroĝ  
Al la lando dezirata [cejano  
iras mi tra bordo glata  
de l' river'  
kun kor-esper'.

Urbo brua, peke-krima, kun sonoro trapavima.  
Homamaso sur prospekto. Polican' — sever-  
[aspekto.  
Nokto tutan urbon prenis — ĝin per dormo  
[enkatenis.  
Senhomiĝis trotuaroj. Nur malofte pasas paroj.  
Al la lando de la belo  
iras mi kun rekta celo  
kaj sen tim'  
tra la pavim'.

« Vi enuas, Vi sinjoro?! Lasu pensi pri doloro.  
Min Visekvu tra ĝardeno. Vin atendas ama sveno»  
Ekkrigardis mi figuron kaj eksentis kor-teruron:  
Ho, similis la virino je l' amata fianĉino!

Kaj la celon mi perfidis —  
interrompi mi decidis  
ĝin por hor'  
pro kon-esplor'.

Kaj humile-rapideme paŝis mi kun ŝi nerveme;  
Voluptante brulosente ŝi rigardis, ardis tente...  
« Ni jam venis hejmon mian. Nu, demetu palton  
[Vian »...  
Ŝi enbrakis min pasie. Mi pasivis malkonscie.  
Mi la landon revigesis,  
pri la celo mi forgesis

en admir'  
pro ama spir'!

« Kial Vi observas mute?! Senvestiĝu tuj kaj tu  
Ne ŝajnigu naivulon! Kontentigos mi postulon  
Per blankeco ŝi brilante min karesis premiĝan  
Pro nudeco malkovrita estis mi pasiigita.

Kaj la revon mi forgesis,  
min la land' ne interesis,  
en pasi'  
ekdronis mi.

La voluptokorpon skuis. Kiskaresojn mi plengi  
Jen laciĝis — ebriiĝis, ripozinte reflamiĝis  
Al mi ŝajnis, al mi ŝajnis, ke mi « ŝian » am  
[gajn

Ke jen « ŝi » al mi premiĝis kaj amante fordoniĝ  
Al mi ŝajnis atingita  
la Bellando dezirita,  
sub kisar'  
de l' amaltar'.

[mova  
Jen vekiĝis urb' malnova... De tramvoj' sono  
Lasis mi komforton litan, ŝin rigardis, la amita  
« Estas nur prostituino — de la vivo ĵetflir  
Ŝajno estas de la vero, nekapteblo kaj ĥimero

Kie estas land' — lazuro?  
Staras nur de l' nokto muro.  
Baras ĝi,  
kaj haltis mi.

Kun akuta dolor' lasis ĉambron mi for.  
Kun la kor', kiu ploris premite.  
Kaj denove en sol' iris for de popol',  
sen konsol' iris kompromitite  
el kuŝejo de l' pseŭdo-karin!  
Supre pendis nebul', paŝis mi solecul'  
en cirkul' de amaso frivola,  
kaj mi pensis al « ŝi » — mia sola radi',  
fantazi' aŭ realo simbola  
de ĉiama dezir' al rafin'.

Mi nenion konsciis —  
eble mi fantaziis,  
eble estis nur sola imago.  
Tamen, ĉu ne egale?!  
Tra nebulo korale  
aperetis la astro de l' tago.  
Kaj kareso pasia de la suno radia  
en la koran penetris profundon,  
kaj kvieton donacis, kaj ameme kuracis,  
kaj iome dolĉigis la vundon.

## VII

En silento de nokto malluma kaj peza,  
sub la ŝargô de pensoj tedeme venantaj,  
sub la prem' de pasio volupte tentanta,  
for de mia junino amate-amanta  
    min ekkaptis la paroksismo freneza.  
En koŝmaro de nokto, kun stranga amem'  
    mi ekamis min mem.

Sed ne kisoj dolĉaj sonis reciproke,  
ne pasia korp' al korp' kontaktis —  
    en volupto mi baraktis...  
    Faŭkis la mallumo make.  
Luktis mi malforte-forta, luktis...  
    vane penis, sed nenio fruktis.

Sola « ŝi » min savi povus de mi mem  
per karesoj patrinecaj kaj sentem'.  
Sola « ŝi »... Sed estas revo, iluzio?!  
    Ĉu solviĝos iam tiu ĉi problem' ?  
    Estas ĉio kaj nenio.  
    Ĉu ekzistas eĉ « mi mem » ?  
Eble « mi » estas nur fantazio!?!

Saratov, 1918-



# Papilio

---

*Dediças al amiko Polakov V.*

Estas mi — papili'  
gajflirtanta en aero,  
dancas mi, ĝojas mi  
tutan tempon dum somero.  
De la lun', ĝis la sun'  
kun korjun'  
flugas mi ;  
de la ter', de mizer',  
de sufer'  
flugas mi.

Kantas mi, gaja tril'  
ĉie flugas kun sincero,  
brilas mi perflugil',  
ĉiujn vokas al etero.  
Firmament', dolĉa sent',  
sorĉa tent'  
regas min.  
Sunradi' ! Harmoni' !  
Dancas mi  
en senfin' !

Mi estas filo  
de suna brilo,  
kaj perflugilo  
kometas mi.

Senzorge spiras,  
naturon miras,  
mi kantas — liras,  
sonetas mi.

Aromojn glutas,  
petolojn ŝutas,  
ampersekutas  
kuninon mi.

Ho, ŝi rifuzas,  
min korkontuzas,  
sed ne ĵaluzas,  
belinon mi.

Mi pluen vojaĝas  
sen ia difino,  
mi dronas, elnaĝas  
tra nuba river' ;  
naturo pejzaĝas  
sen limo, sen fino.  
Kaj mi ne domaĝas  
pri laso de l' ter' !

Tie sube post mi restis plene  
maljusteco, envio, dolor', —  
ĝi inkube torturis katene,  
ĝis mi lasis kaj flugis mi for.  
Min turmentis kruela ofendo,  
profanado al mia korpur', —  
Mi ne pensis pri vana defendo  
kaj formigris al vasta lazur'.

Tie, ĉie  
helradie  
suno ridas jen ;  
brile-trile  
mi facile  
flugas tra seren'.

Mi estas papilio  
kun varianta koro,  
ne scias pri envio  
kaj pri koler-memoro.  
Mi flirtas, gajas, ridas,  
nuancas per koloro  
kaj vivi ĝu-rapidas  
dum regas varma horo.

« Al sun', al sun' » ridetas la naturo,  
« Al sun', al sun' » batbatas mia kor'...

Baniĝas mi en suna uverturo,  
konkordas mi kun kosma fluga ĥor'.  
Kaj malsupre restis montoj kaj abismoj faŭkaj,  
kie raŭpis mi en stato de malforto,  
kaj de kie sonis voĉoj nazetone-raŭkaj,  
kie min minacis ekposedi morto.  
Frostoj kaj glacio, fal' abrupt-subita,  
monstroj, strangaj monstroj kun simil' je homoj,  
erupci' de puso el vulkan' zenita  
kaj senĉesaj fluoj de mucidaj vomoj.

Ne, mi ne bedaŭras, ke lasis mi subon,  
mi libera iĝis en ĉielen-flugo;  
mi flirtante celas tra nubon kaj nubon,  
al la suno hela celas mi en fugo.

Mi malsupre havis floron, belan rozon,  
kiu sola povis doni la ripozon  
dum alveno de krepusko.

Mi vizitis ofte la amatan floron  
kaj al ŝi malkaŝis la amatan koron...

Rozo kreskis inter musko...

Foje mi alflugis... Rozon jam ne trovis —  
ŝin kruela vento, vento ŝin forblovis,  
kaj por mi survenis la krepusko.

Natur' ne atentis,  
ke mortis la floro ;  
la koro lamentis  
pri rozo-viktim'.

Mi restis en solo  
kun mia doloro,  
sen ĉia konsolo  
je mia anim'.

Tamen sun' ekbrilis,  
najtingal' ektrilis,  
kaj sekiĝis miaj larmoj for.  
Sed la koro febris,  
amon ĝi funebris  
kaj ploregis pri la amaŭror'.

Ne, mi ne bedaŭras, ke teron forlasis —  
(ĉu povas mi vivi, se mankas kunuloj ?)  
Kaj jen mi ekmigris, feliĉon ekĉasis :  
ja, eble, ĝin trovos mi inter nebuloj.

Mi vin adiaŭs, ho raŭpoj rampantaj,  
mi flugu superen sen vol' je reveno ;  
ĉielaj profundoj min logas bluantaj,  
libere mi spiras en pura sereno.

Mi papilio estas,  
infan' de sunradi',  
mi sunbriladon festas  
kaj himnas mi al ĝi :

« Nur vi, nur sola vi —  
ja estas amo, vero,  
eterna poezi',  
eterna junlibero ! »

Harkov, 10 Aprilo 1919.

## Printempaĵoj

---

*Dediĉas al mia edzino-amiko.*

Vento karesis miajn buklojn  
Kvazaŭ amatino dum horo de l' amo ;  
kisis la vento miajn lipojn —  
sur ili mi sentis ebrion de l' amo.

Mi komprenis grandan sakramenton,  
sakramenton de l' naturo ;  
mi ekamis arde-flugan venton,  
kiu kisis min en puro.

Ĝi min kisis, — malaperis,  
jen aperis, jen foriĝis,  
jen kliniĝis, jen aeris —  
mi pro kisoj ebriiĝis.

Vento, kiso, ĉirkaŭpreno,  
korpa sveno, ventofluoj,  
kaj turkiso — firmamento,  
farniento, amoĝuoj.

Mi vin gloras en la kanto,  
vin adoras la animo;  
estas ankaŭ mi vaganto,  
vi — aera, mi — en ŝimo.  
Tial amas koro mia  
vin, potenca, flugpasia.

Mi estas bardo  
de suna ardo,  
al ĝi kantadas kore mi;  
ĝi estas dio  
de poezio  
kaj de pasi'.

Dum ĝi karesas,  
mi plenforĝas  
kaj mi ripozas je banal' ;

la pens' vojaĝas,  
en revoj naĝas  
al Ideal'.

Suno, varmo, bluo,  
ĉarmo, junco, oro,  
rido, larmo, ĝuo,  
varmo en la koro.

Simfonio de printempo. Junaj tuŝoj  
de la vento blovetanta.

Harmonio, dolĉa tempo. Sunaj duŝoj;  
mararĝento strietanta.

Sur bulvardo verdiĝanta sidas paro :  
gefianĉoj ŝajnas ili ;  
amrigardo korpikanta ; ridas maro ;  
arbobranĉoj ŝajnas trili :

« Amu vin, amu, junkoroj,  
dum tempo-junco torentas,  
dum ekburĝonas la floroj,  
dum la amemon vi sentas ».

Nokto trankvila surnaĝas al lúna mar'  
ĉio ekdormis en tuta ĉirkaŭ',  
nur aŭdiĝetas korbatoj de l' júna par'  
kaj iufoje de katoj : « miaŭ', miaŭ' ».  
Brilas okuloj, plenplenaj de áma larm'  
pro dolĉatendo, ekstazo kaj rav' ;



tamen en koro sentiĝas de drám' alarm'  
kaj alĝi ŝajnas jam plendi: « miaŭ', miaŭ'... »  
Pasos amtempo simile al mára ond',  
venos kruela kun am' adiaŭ'....  
Koro tremetas, kaj ehas amár-respond' :  
« Miaŭ', miaŭ', miaŭ'.... »

« Fji, fji, fji... » sonas melodi' —  
ŝute-trilas najtingalo...  
Tsss... Aŭskultu ni.

« Mi estas malgranda birdeto,  
modesta kun griza plumar',  
kaj tamen mi estas poeto,  
helpanto en amo-deklar'.  
Min ĉiuj amantoj tre ŝatas,  
aŭskultas al mia gajtril',  
dum koroj iliaj trilbatas  
sub nokta silenta kovril'.  
Mi kantas nur aman plezuron,  
belaĵojn, belecon de l' viv',  
ĉar mem ili spertos teruron,  
banalon de l' prem-efektiv'.  
Nu, ili nun amu sincere,  
dum pulsas en kor' emoci',  
ĝis venos kruele-severe  
la tempo de l' viv-konvulsi'.

Al ili mi kantos fabelon,  
dormigan fabelon de l' sud',  
ĝis luno forlasos ĉielon,  
ĝis tago banalos en krud'.  
Dorlotu, ho kanto, junkorojn  
per trilaj koloroj de l' am',  
dum ili ne scias dolorojn,  
dum vivo nur ŝajnas ornam'. »

Nokto svenigas nin; tera parfumas sin';  
korpo sopiras al ĝu'.  
Steloj smeraldas jen... Stele-briletas ben',  
ben' de ĉiela helblu'.  
Spiras natur' je l' am', flosas satur-balzam',  
koron plenigas dezir'.  
Lipojn kunligas kis', kaŝas arbust-kulis'  
korpojn en ama delir'...

Matenruĝo nin surprizas  
lacajn de l' pasi-ebrio;  
ĝiaj strioj nin avizas  
pri venonta sunradio.  
Ni nin levas de-sur molaj  
herboj verdaj, rosebrilaj,  
kaj revenas mut-parolaj  
kun la koroj pac-trankvilaj.

Harkov, 26 Aprilo 1919.

# Torento

---

*Dediĉas al mia unua amiko L. Gonĉar*

De monto alta, en fal' senhalta,  
torento kuras,  
perlante fluas, liberon ĝuas,  
karesmurmuras.

Tra tuta mondo ŝaŭmadas ondo,  
freŝecon spiras ;  
pelante ŝlimon, ĝi la animon  
al Puro tiras.

En akvo ludas la sun' korala  
per helradi'...

Nuancas akvo en flu' defala  
kaj frustras ĝi :

« ... Venu al mi, ĉiuj junaj,  
kun varma, kun freŝa la kor' ;  
fluos ni fortaj kaj kunaj,  
la sunon kantante en ĥor' :

« Suno hela, suno varma,  
lumradia,  
sur la bela, sur la ĉarma  
firmament',  
al vi iras nun sincera  
kanto nia,

vin aspiras jen libera  
la torent'.  
Diamanta, en purpuro,  
varmodona,  
sun' brilanta en lazuro,  
en altec',  
ni vin gloras, ho Potenco  
orekrona,  
vin adoras, ho Esenco  
de Belec'. »

Verdaj ondoj trabatas graniton,  
ĉion voje forportas kun si,  
al Malnovo deklaras militon,  
belkantante en mova pasi'.  
Verdaj ondoj kunportas fervoron,  
flamigante per nova rimed',  
donas povon, instigas laboron,  
pligrandigas fortecon de l' kred'.  
Ŝprucas akveroj de l' Helo,  
ŝprucas tra la universo ;  
brilas perleroj de l' Belo,  
ŝutas kolorojn en verso.  
Kantas la ondoj pri Vero,  
diras pri fin' de turmento...  
Vokas al plena libero  
verda libera torento.

Saratov 1918..

# ENHAVO

---

Enkonduko . . . . .	5
Dediĉo al L. Ivn . . . . .	7
Al L. Ivn . . . . .	8
Letero al L. Ivn. . . . .	9
Mi stelojn jungos... . . . .	12
Mi estas... . . . .	13
Perlas per la belo stelo-stilo. . . . .	14
Ciklo de l' Argenta Astro . . . . .	15
Amaj Melodioj. . . . .	19
Paraleloj . . . . .	23
El Ciklo « Frenezo » . . . . .	25
El Abismo al Suno, ciklo de poemoj. . . . .	34
I. Ajno . . . . .	37
II. Papilio . . . . .	51
III. Printempaĵoj . . . . .	56
IV. Torento . . . . .	61



---

---

CENTRA PRESEJO ESPERANTISTA  
V. POLGAR, 33, RUE LACÉPÈDE, PARIS

---

---



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

1025 I